La 3a evento okazis en MJC Ph. Desforges, nia sidejo, de la 28a de septembro ĝis la 2a de oktobro. Du aŭ tri centoj da personoj vidis ĝin tie. Krome, pro la diversaj komunikoj anoncantaj la ekspoziciojn, la televida skipo de FR3 interesiĝis kaj rendezuis kun ni la 28an de septembro. Dum preskaŭ du horoj oni filmis nin, en skeĉeto aranĝita de televid-ĵurnalistoj. Rezultis el tiu "monto" akuŝo de "muŝeto": 3-minuta elsendo okazis ĉe FR3 la ĵaŭdon 1an de oktobro, inter la 12a08 kaj la 12a11. Ŝajne neniu rimarkis ĝin!

Nun, parola kurso tamen sukcesis: 11 personoj venis sinsekve por lerni Esperanton ekde la 19a de oktobro. Mi devis trifoje ripeti la 1an lecionon! Restas 8 gelernantoj, kiuj sufiĉe regule partoprenas ĉiumerkrede. 4 el ili ĉeestis la staĝon en METZ. Krome nia kurso "Preparo al Kapableco" okazis la 7an de oktobro kaj la 13an de novembro kun 3-4 partoprenantoj. Zamenhof-vespero okazos la 16an de decembro, la venonta supera kurso la 23an.

J.-P. COLNOT

BETSCHDORF *

La 4an de oktobro okazis metiista kaj porlibertempa ekspozicio. Lastminute mi haste elrabis el mia ŝranko dokumentojn, leterojn, panelojn, ktp; koncernantaj la centjariĝon de Esperanto. En la biblioteko staras daŭra prezentado. Multaj informiloj estis disdonitaj. Je la fino de tiu evento mi longeparolis kun la vilaĝestro, kiu estas preta subteni la movadon... "Vi disvastigas la grenon... atendu la rikolton!" Vespere mi estis... senvoĉa sed feliĉa!

La 10an de oktobro mi akceptis 50 personojn de AVIGNON, inter ili troviĝis 12 esperantistoj. Mi vizitigis, kiel kutime, la potfarejan muzeon, la preĝejon en kiu troviĝas rimarkinda pentraĵo de la XVa jarcento. Ni tagmanĝis kune, kompreneble! Mi ricevis donace libron titolitan "El la vivo de Syunkin", dediĉita de la prezidantino de la avignona grupo.

Odette SCHEIDEL

BAR-le-DUC *

Sekve al klub-kunveno estis decidite lanĉi novan publikan kampanjon cele eventualan malfermon de kursoj. Tiucele 32 "kulturaj" asocioj de la urbo ricevis dokumentaron ampleksan pri esperanto. La 17an de novembro okazis publika inform-kunveno en salono de la urbdomo. Ni menciis, ke 26 magazenoj de la urbo konsentis alglui afiŝon por anonci la kunvenon. Ankaŭ l'EST REPUBLICAIN aperigis trafan longan komunikon pri ĝi. ... 4 personoj venis! Ili spektis kun kelkaj klubanoj prezenton de diaposerio kun komento surbendigita.

Momente 6 personoj ceestas la 1a-gradan kurson: 4 el ili estas varbitaj de klubano! Cetere du geknaboj daŭrigas sian lastjare komencitan studadon per la "Junulkurso". Tri aliaj klubanoj preparas la "Kapablecon" kaj laboras diligente en "familia" etoso.

La tradicia Zamenhof-vespero okazos la 19an de decembro. Jam 20 personoj aliĝis. Tri grupanoj ĉeestis la Festivalon en ISSY-les-MOULINEAUX. En la venontjara programo ensoviĝas partopreno en la internacia karnavalo kaj grup-vizito de la Muzeo de GRAY la unuan de majo 1988.

Menciindas la plurtaga ĉeesto de du Rumanoj -patro kaj filo, tiu-ĉi lasta, inĝeniero- kiuj vizitis sian korespondantaron. Ili estis for de sia propra lando por la unua fojo! Ili povis ĝui ĝisfunde la gastemecon de esperantistino kaj konscii konkrete pri la homa, neanstataŭebla valoro de esperanto!

 INTERNACIA STAĜO EN HOMBURG (FRG)

La 4/6ajn de decembro arigis sesdeko da partoprenantoj, okaze de la 30a Kultura Semajnfino de S.E.L. (Sarlanda Esperanto-Ligo) en Homburgo (FRG). El tri landoj -FRG, NEDERLANDO kaj FRANCIIO- venis la esperantistoj. La atendita preleganto, Profesoro Ivo LAPENNA, pro malbona sanstato, ne povis veni; li devis prelegi pri "Humaneca Internaciismo".

Tamen ni spektis video-kasedon pri liaj paroladoj okaze de la Jubilea Konferenco en GRAZ (Aŭstrio) =festparolado kaj inaŭguro de la specifa monumento= * Du aliaj prelegantoj anstataŭis lin: S-r° Heinz Dieter MAAS prelegis pri la "Radikoj en Esperanto"; Pastoro Adolf BURKHARDT pri du temoj: "Vojaĝo al Koreujo" kaj "Historio de la gazeto DIA REGNO".

Kiel kutime la etoso estis ege simpatia, ĉefe post la vespermanĝo, kiam Sankta Nikolao (Sr° Günther BECKER) disdonis al la etuloj kaj ankaŭ al la plenkreskuloj donacetojn!...

Catherine ROUX

* Bildo pri la aludita monumento vi malkovros en la artikolo pri filatelio (NDLR)

 INTERNACIA STAĜO EN MONTIGNY (MOZELO)

Impresoj ĉe la 25a stago de parolata esperanto en MOULINS- kaj MONTIGNY-lès-METZ

Veturante al METZ mi trapasis la belegan pejzaĝon de la nordaj Vogezoj kaj post mallonga serĉado en la grandurbo mi atingis "L'Ermitage".

Tie mi estis afable salutata, ricevis la dosierojn -metitaj en bele inustritan koverton-, serĉis kaj okupis mian ĉambron.

Je 14.45 mi partoprenis la kurson de André CHERPILLOD. Li prelegis lerte kaj interese pri "Jeanne d'Arc" (Ĵana d'Arko), menciante ke ekzistas du misteroj: ŝia naskigo kaj ŝia morto! tion li detale pritraktis kaj pruvis, ke la oficialaj datoj (1412 - 1431) ne estas ĝustaj. Sr° Cherpillod raportis pri libroj de la urbo Orleano, kiu montras ke Jana d'Arko reaperis en 1436!

Post tiu ampleksa prelego ĉiuj 60 partoprenantoj kolektiĝis en la "kastelo" por vespermanĝi. En geamika rondo ni sidis kune... Sekvis la nostalgia vespero okaze de la jubilea stago. Edmond LUDWIG salutis nin kaj Jean-Paul COLNOT prezentis malnovajn diapozitivojn pri la vivo de la Federacio Franc-Orienta. Dum la paŭzoj ni havis eblecon rigardi kaj aceti librojn de la granda libro-servo.

Dimance mi denove aŭdis Sr°n Cherpillod pri "aglutinaj kaj fleksiaj lingvoj". Li bonege klarigis la diferencojn inter la hindo-eŭropaj kaj finn-ugraj lingvoj. Ekzemplojn el la hungara, turka, franca, germana, japana, ketĉua lingvoj li prezentis.

Kelkaj kursanoj forlasis nin por viziti la dulingvan altan meson en la preĝejo de Montigny, kiun partoprenis ĥoro, urba muzikantaro kaj Roger DEGRELLE. Poste ni aŭdis koncerton antaŭ la "Salle Europa". Oni interalie ludis nian himnon, "La Espero" kaj la esperantistoj kunkantis. Sekvis la inaŭguro de la placo "ESPACE ESPERANTO" per malkaŝo de verda flageto, kiun kudris Odette SCHEIDEL. Ĉar malvarmis, la festaj paroladoj okazis en apuda salono, kie bonvenigis kaj salutis nin la urbestro de Montigny, la prezidanto LUDWIG kaj la ĉarma organizantino Marthe NAU. Ni havis eblecon rigardi intresan video-bendon pri Esperanto-instruo en kolegio (Villefranche-sur-Mer).

Sekvis invito al honorvino kaj belega malvarma -kaj varma!- bufedo. Esperantistoj, muzikistoj kaj la honoraj gastoj ĝuis gin, amike parolante. Ni reveturis al Moullins por tagmanĝi; posttagmeze ni komune vizitis la filatelian ekspozicion kun multaj Esperanto-poŝtaĵoj, en la "Maison pour Tous" de Montigny.

Du belajn tagojn mi travivis en Esperantujo, por kiuj mi kore dankas al la organizinta teamo.

Durmshheim (FRG)

Lothar ECKERT
Durmshheim (FRG)

"... estante ĝenulo (!?) mi alvenis por la stago unu tagon pli frue... Tamen la organizantino mem, S-in° Marthe NAU, kaj S-in° Odette SCHEIDEL bonvenigis min ĉe la stacidomo kaj kondukis min al restoracio; tre agrablaj, tiaj esperantistoj! Tiam Odette, kun oficiala gvidistino, montris al mi vidindaĵojn de METZ interalie la sanktajn lokojn; dume Marthe floriris por fiksigi Esperanto-panelejojn en "L'Ermitage" kaj en la

"Maison pour Tous".

En l'Ermitage ankaŭ la mildaj gardistinoj bonvenigis min... ilia hundo eĉ provis kompreni la anglan lingvon... Sed neniu komprenas la Anglan!

Sabate aperis Patrick kaj ties edzino por veturigi min al la Filatela Ekspozicio kiu enteris multajn historiajn trezorojn. Poste, pli da historio per novaj pensoj pri Ĵana d' Arko, danke al André Cherpillod. (Nuntempe... la Rusoj "retaksas" sian heroon Stalin!). Ankaŭ la diapozitivaj de J.-P. COLNOT montris, ke ĉiuj estis junaj... pasintajn jarojn!

Dimanĉon, matene, ni faris historion per malkovrita ŝildo por la unua jarcento de internacia interkompreneco, amikeco, helpo kaj espero.

Individue niaj streboj aspektas malfortaj... Sed la bezono por "ordinaruloj" paroli trans la mondo kreskas... Ili malkovros, ke ni posedas La Rimedon!"

Bill THORNE
London (Anglio)

ĈU LA PLEJ GRAVA ESPERANTO-MUZEON EN EUROPO?

Antaŭ unu monato mi estis vizitanta la NACIAN ESPERANTO-MUZEON en GRAY (Haute-Saône, Francio).

Mi estis surprizita pri la nombro de ĝiaj ĉambroj, ĉiuj plenplenaj de la planko ĝis la plafono! La nombro de kolektitaj dokumentoj en tiuj 10 salonoj estas nekredbla: pli ol 4000 titoloj de libroj por sin nutri spirite dum tagoj kaj eĉ jaroj!

Emociigaj ankaŭ estis tiuj multaj objektoj kaj dokumentoj diversaj precipe fotoj atestantaj la laboron, la fidon al nia lingvo, de pioniroj, kiuj, nun, povus konstati, ke ili estis sur la bona vojo kaj en la unuaj tempoj ne perdis sian tempon!

Mi instigas ĉiujn esperantistojn viziti tiun muzeon por revivigli sian kuraĝon kaj se eble pliriĉigi tiun vastan ekspozicion!*

Ghislaine COLLIN

52400 BOURBONNE-les-BAINS

* La E^o-klubo de BAR-le-DUC planas grup-viziton de la Muzeo la 1an de majo 1988. Estus interese, se aliaj kluboj (ec eksterlandaj!) kaptus ankaŭ tiun okazon por veturi tien... Vi kontaktu la redaktoron de LA INFORMILO.

Sr^o JUNIER, kuratoro de la Muzeo, anticipu bonvenigas ĉiuspecajn donacojn por riĉigi la "trezorejon"!



RENKONTIĜOJ... STAĜOJ... KONGRESOJ...

Nia venonta n^o (61) aperos tre frue komence de 1988 kaj informos vin detale pri la nova ESPERANTO-KALENDARO... Sed ek de nun bonvolu noti:

- = 26a Staĝo de parolata esperanto: dato fiksota
- = FEDERACIA KONGRESO: 16/17ajn de aprilo en MULHOUSE
- = NACIA KONGRESO de U.F.E.: Pentekoste en ROUEN (vidu aliĝilon en ĉi-tiu n^o)
- = UNIVERSALA KONGRESO de U.E.A.: 23/30ajn de julio en ROTTERDAM (vidu ankaŭ aliloke)
- = INTERNACIA KONGRESO de la E^o-JUNULARO: 9/16ajn de julio en ZADAR (Jugoslavio)

Aliĝilo (VIDU ALIĜKOTIZOJN
ROTTERDAMO DORSFLANKE)

**73a UNIVERSALA
KONGRESO
DE ESPERANTO
23a - 30a julio 1988
Rotterdam, Nederlando**

Konstanta adreso: Universala Kongreso de Esperanto,
Nieuwe Binnenweg 176,
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Poŝtĉekkonto de la Kongreso: n-ro 62 73 37 (nederlanda)
Banko de la Kongreso: AmRo Bank, Rotterdam, n-ro 42.69.01.444

ĈIU ALIĜANTO UZU APARTAN ALIĜILON, FOTOKOPION AŬ SAMFORMATAN PAPERON – BONVOLU
TAJPI AŬ SKRIBI PRESLITERE. LAŬBEZONE METU KRUCON EN LA KONCERNAJN KVADRATETOJN.

FAMILIA NOMO **VIRO/VIRINO**
(por alfabeto ordigo) (forstreku unu)

CETERA(J) NOMO(J) **UEA-KODO**
KOMPLETA POŝTA ADRESO (nacilingve en latinaj literoj kun poŝtkodo ĝuste lokita)

LANDO **TEL. N-RO**
(en Esperanto) (kun prefikso)

NOMO/UEA-KODO DE KUNULO aliĝinta / samtempe aliĝanta

PROFESIO/FAKO **NASKIĜDATO**

Mi aliĝas al la Kongreso laŭ la kondiĉoj presitaj sur la dorsa flanko;
mi sendas ĉi tiun aliĝilon kaj samtempe pagas laŭ la ĉi-suba specifo al:
 mia landa peranto
 Rotterdam
per: poŝtmandato poŝta ĝiro banka ĝiro aŭ ĉeko, aldonante 9,00 gid
aŭ: Mi sendas ĉi tiun aliĝilon rekte al Rotterdam – bv. debeti mian UEA-konton
 Mi ne povas jam aliĝi pro pasportaj aŭ transpagaj problemoj. Mi promesas pagi tuj post alveno en la kongresejo.

Mi legis, komprenas kaj akceptas la kondiĉojn sur ĉi tiu aliĝilo.

DATO **SUBSKRIBO**

Por uzo de la administracio		KOTIZO (en kategorio.....)
uea-membro paginta por jaro		ADOPTA KASO
konfirmo de peranto:		BLINDULA KASO
konfirmo de C.O.:		LITERATURA KASO
PAGO EN C.O.	KONFIRMILO	ADOPTAJ GEPATROJ
notoj		BANKKOSTOJ (9,00 gid)
		ENTUTE
		Se vi aliĝas senpage, bv skribi ĉi tie la motivon

ROUEN ...JEN NIA PENTEKOSTA


Muzea Urbo je nur unu horo de Parizo. La urbo de la cent sonorilturoj. RENDEVUO!

En la centro de la urbo, la stratoj restis tiel mallargaj, kiaj ili estis dum la mezepoko. Multaj konstruaĵoj estas atestoj de riĉa pasinteco.

La strato "Akvo-de-Robek" eltiras sian nomon el la rivereto, kies akvon uzis la tinkturistoj; la subtegmentejoj de la domoj, kiuj rolis kiel sekigejo por la teksaĵoj, estis primitive malfermitaj al aero.

En la "Placo de la Malnova Merkato", estis bruligita Jana de Arko en 1431. La loko de la turmento estas signita per granda kruco kaj preĝejo estas dediĉita al la sanktulino.

Tre tipa kaj vigla ankaŭ estas la strato de l'Dika Horloĝo, kun belaj malnovaj domoj kun lignaj murfacoj: en la ĉirkaŭaĵoj efektive abundis arbaroj. Meze de la strato, oni pasas sub arkaĵo, kiu surportas renesancan paviljonon ornamitan per horloĝaj ciferpatoj. La mekanismo daŭre troviĝas en la belfrido de la XIV-a jarcento.



NE PROKRASTU VIAN ALIĜON AL NIA NACIA KONGRESO!

**80a Franca Kongreso de Esperanto en Rouen
dum Pentekosto (de la 20a ĝis la 24a de majo 1988)**

Nomo :

Antaŭnomo :

Adreso strato :

urbo : **poŝtkodo** :

Dato : **Subskribo** :

Kotizoj ĝis la	31/12/1987		Poste	
	membroj	nemembroj	membroj	nemembroj
Kongresan(in)o	180 F	200 F	195 F	215 F
Geedzoj	295 F	305 F	310 F	320 F
junuloj (ĝis 18a jaro)	110 F	130 F	120 F	140 F
kaj studentoj eksterlandanoj	senpage		senpage	

JES, NI CERTAS, KE VI VENOS! KORAN BONVENON!

ENRICHISSEZ VOTRE FRANÇAIS

Pour former à partir d'un nom l'adjectif correspondant, il suffit en Espéranto d'en modifier la finale: *fingro - doigt, fingra - digital*. En français c'est un peu plus compliqué, mais si peu ... Voyons si vous trouverez les adjectifs français correspondants aux noms suivants :

boeuf, cheval, chien, cou, cloître, chanoine, déluge, écrit, eau, foyer, livre, lion, domicile, loup, monarque, matin, midi, moine, monnaie, menton, médecin, mois, minute, mouton, neige, nuit, pluie, pharmacie, peau, peinture, problème, queue, soir, siècle, semaine, température.

RÉPONSES — *boeuf* : bovin ; *cheval* : chevalin, équestre, équin ou hippique (préférable d'utiliser à cha- que fois l'adjectif exact ; dans le cas de *cevala viandejo*, traduire : *doucherie hippopohagique*, merci!) ; *chien* : canin ; *cou* : cervical ; *cloître* : claustral ; *chanoine* : canonial ; *déluge* : diluvial (suivant le *Larousse*) ou diluvien (suivant le *Robert*), débrouillez-vous ; *écrit* : scriptural (au *Larousse*, mais inconnu au *Robert*) et *scriptural* (commun aux deux) ; *eau* : aqueux (plus commun) et *hydrique* (plus chic) ; *foyer* : focal (uniquement en optique, ailleurs débrouillez-vous) ; *livre* : livresque (pé- ratif) ; *lion* : leonin ; *domicile* : domiciliaire ; *loup* : rien à ma connaissance ; *monarque* : monar- chique ; *matin* : matinal (mais *maturnal* est plus BCBG) ; *monnaie* : monétaire (à peu près) ; *menton* : rien à ma connaissance (mais ne nous fatignons pas : nous avons déjà *héparatique* pour *foie*, *gingival* pour *gencive* et *capillaire* pour *cheveu*) ; *médecin* : médical ; *mois* : mensuel ; *minute* : rien ; *nuit* : on a déjà donné pour *heure* (*horaire*), cela suffit sans doute ; *mouton* : ovin ; *neige* : nival ; *nocturne* : pluvial ; *pharmacie* : pharmacaceutique ; *peau* : cutané ; *peinture* : pictural ; *pro- blème* : problématique ; *queue* : caudal ; *soir* : vespéral ; *siècle* : séculaire ; *température* : vous re- passez.

Quelques esprits chagrins ne verront pas la simplicité merveilleuse de la langue française ; Dieu merci, l'anglais, langue internationale, présente des rapports plus évidents : *king* : royal ; *tooth* : dental ; *tongue* : lingual ; *mouth* : oral ; *back* : dorsal ; *chest* : pectoral ; *finger* : digital, etc.

Vi povas pagi viajn aliĝ-kotizojn al....

Union Française pour l'Espéranto (UFE) 4 bis rue de la Cerisaie - 75004 Paris

73a UK ROTTERDAMO 23-30ajn de julio 1988

aliĝkotizoj	ĝis 31-12-87	ĝis 14-5-88	poste
kat. 1	434 FF	543 FF	651 FF
kat. 2	543 FF	651 FF	760 FF
kat. 3	217 FF	326 FF	434 FF
kat. 4	396 FF	434 FF	543 FF

- kategorioj: 1. individua membro de UEA
2. Ne individua membro de UEA
3. Kunulo/junulo/handikapulo, kiu estas individua membro de UEA
4. Kunulo/junulo/handikapulo, kiu NE estas individua membro de UEA


difinoj: "individua membro de UEA" estas tiu, kiu estas dumviva membro, membro kun jarlibro aŭ membro-abonanto.
"junulo" estas tiu, kiu je 1.1.1988 estas malpli ol 26jara.

Rajtas senpagan aliĝon la nemalhaveblaj hel- pantoj de handikapuloj, kaj la infanoj malpli ol 13jaraj, akompanataj de plenaĝa kongresano.

Por la limdatoj validas la dato de pago. Oni nepre sendu aliĝilon kaj kotizon al la sama in- stanco.

Sur la unua paĝo de la aliĝilo de UEA, indiku la sumojn en nederlanda mono.

CCP de U.F.E. : 855 35 D PARIS



funebro

Ni estas ĵus informitaj de la forpaso de Dr^o Paul NEERGAARD, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, mem- bro de Hinda Nacia Scienca Akademio (New-Delhi), Nacia Akademio de Agrikulturo (Parizo), estinta Direktoro de la Dana Ŝtata Instituto pri Sempatologio por Evolulandoj. Dr^o NEERGAARD famiĝis kiel faklingvisto kaj verkinto de multaj sciencaj studoj rilataj interalie al la vivo de la plantoj.

Kelkajn tagojn poste -la 15an de decembro- forpasis Dr^o Ivo LAPENNA, 78-jaraĝa, Ĝenerala Sekretario de UEA de 1955 ĝis 1964, Prezidanto de UEA de 1964 ĝis 1974. Dr^o LAPENNA apartenas al la kategorio de la tiel nomataj "tenoroj" de Esperanto. Li elstaras kiel multifaceta verkisto, altkvalita oratoro kaj nelacigebla laboristo por ĉiufanka disvastiĝado de la Internacia Lingvo. Ivo LAPENNA estis Dr^o pri Juro, Dr^o "honoris causa" pri Inter- naciaj Rilatoj, Profesoro en la Universitato de Londono. Krom esperanto-lingve li verkis kroate, angle, france, germane kaj itale.

La 9an de aŭgusto, in "Franca Pres-agentejo" dissendis komunikon okaze de la Esperanto-Jubileo, al diversaj gazet-redaktoroj. Laŭ nia ĝisnuna scio, nur "Le Figaro" kaj "Les dernières Nouvelles d'Alsace" publikigis la aluditan komunikon, kies enhavo prezentas esperanton tute subjektive kaj -multe pli grave- tre senvalorige! Tiam artikolon niaj legantoj povos havigi al si kontraŭ aŭfrankita koverto al la redaktejo de "La Informilo".

Multaj esperantistoj tuj reagis, eĝ vigle!... Ĉi-sube vi malkovros letero de nia vic-prezidanto, J.-P. Colnot kaj de H. Masson, sekretario de SAT-AMIKARO, leteroj senditaj al la ĉefredaktoroj de "L.D.N.d'A."

LAXOU, le 28/8/1987

J.-P. COLNOT
15, Rue de Lavaux
54520 LAXOU

à Monsieur le Rédacteur en Chef,
"LES DERNIÈRES NOUVELLES D'ALSACE"
17, Rue de La Nuée Bleue
67000 STRASBOURG

Monsieur le Rédacteur en Chef,

Je viens d'avoir en main l'article sur l'espéranto paru dans votre journal du 13 août. Je pense que votre journal a légèrement manipulé l'information pour ridiculiser l'espéranto. Il existe certes des associations d'anarchistes, d'homosexuels ou de naturalistes espérantistes, mais chacun est libre de se regrouper selon ses affinités. Votre journal aurait pu mentionner parmi les associations tenues pour plus "sérieuses" par le grand public, outre les chemnots cités, l'Association universelle d'Espéranto (UEA), strictement neutre, qui regroupe 44 Associations Nationales et un nombre multiple d'Associations dites "spécialisées", tels que les enseignants, les postiers, les catholiques et... Les journalistes! N'importe qui peut aller fouailler son nez chez les journalistes et y trouver des anarchistes, des homosexuels ou des naturalistes, ou encore des gens pas strictement objectifs, et publier un article faisant supposer que tous sont ainsi...

Quant à l'Académie d'Espéranto, son but n'est pas d'empêcher de dévoiler les structures de la langue mais d'empêcher des déviations dans son utilisation. Au contraire, la grammaire de l'espéranto est d'une si merveilleuse simplicité que les espérantistes ne demandent pas mieux que de la faire connaître /.../ Enfin en ce qui concerne les utopistes je vous rappelle que les grands inventeurs l'ont eues ceux de l'automobile, du chemin de fer, de l'avion...! ont, dans un premier temps, été pris pour des utopistes, jusqu'à ce qu'on s'aperçoive que "ça peut fonctionner". Ajoutons encore que l'UEE (Union Française pour l'Espéranto) est l'association française adhérent à l'UEA, dont le siège est à ROTTERDAM. Le siège de l'UEE se trouve à PARIS (4bis, Rue de la Centrale, 75004).

J'espère que ces quelques précisions intéresseront vos lecteurs et que pendant l'année scolaire qui va commencer vous voudrez bien insérer nos communiqués sans trop les résumer, car cela enlève une grande part de leur intérêt.

Avec mes remerciements, veuillez agréer, Monsieur le Rédacteur en Chef, l'expression de mes sentiments distingués.

J.-P. Colnot
responsable des cours par correspondance d'Espéranto

Fourniture de tous
livres pour l'étude
de l'Espéranto
cours par
correspondance
ouvert toute l'année

ESPERANTO
SAT-AMIKARO union des travailleurs espérantistes des pays de langue française

Paris, le 1er Septembre 1987

Monsieur Alain Howiller
Dernières Nouvelles d'Alsace
17-21, rue de la Nuée-Bleue
67001 Strasbourg Cedex

Monsieur le Directeur,

De retour à Paris, je trouve la photocopie d'un article publié le 9 août dans votre quotidien. Jamais encore je n'ai eu écho d'une attitude malveillante de la part des Nouvelles d'Alsace à l'égard de l'espéranto. Tout laisse supposer que cet article a échappé à votre attention.


Toute la panoplie des mots "dévalorisants" y passe : utopie ou utopiste, anarchistes, communistes, cheminots (sic), pacifistes, "dissidents fanatiques" (en URSS), outil de propagande, homosexuels, zéloteurs, idéalistes, "poignées d'étudiants", c'est-à-dire autant de mots destinés à engendrer, dans le contexte, un réflexe de répulsion pour le lecteur.

Par contre, il n'y a aucune information aussi détaillée sur l'utilisation de cette langue par des savants, des médecins, des informaticiens; aucune allusion aux progrès de la langue dans l'informatique (projet DLT de traduction automatique). L'Académie d'Espéranto a 45 membres et non 40. Parmi les stations radio qui émettent en espéranto, rien que Varsovie et Pékin - donc communistes - sont citées, mais pas Radio Vatican !... Et ceci sans compter les erreurs : Kalocsay est mort, et le siège de l'UFE se trouve à Paris et non à Rotterdam, les démarches auprès de l'ONU n'ont pas été vaines, puisque cette organisation a édité deux documents en espéranto (La charte des Nations Unies, donc le document de base - voir documents annexes, et la Déclaration Universelle des Droits de l'Homme). Il est évident que l'espéranto ne peut venir langue officielle de l'ONU du jour au lendemain, sans information préalable, puis sans l'organisation de son enseignement.

Quelques indices laissent toutefois penser que cet article n'est pas le fait de l'un de vos collaborateurs, mais probablement d'une agence de presse. C'est pourquoi je vous prie de bien vouloir nous indiquer la source de cette information. D'autre part, puisque les preuves ne manquent pas pour démontrer que cet article est le fait d'un journaliste malveillant, nous vous serions reconnaissants d'intervenir auprès de l'agence de presse concernée.

Nous vous serions reconnaissants par ailleurs de réajuster l'image donnée de l'espéranto par la publication d'un article mieux structuré, objectif et dénué d'allusions tendancieuses, basé sur des faits et non sur des allégations. A cet effet, vous trouverez ci-joint une série de fiches-documentation et un dossier qui vous permettront de rétablir la vérité.

Veuillez agréer Monsieur le Directeur, l'expression de mes sentiments distingués.


Henri Masson
Secrétaire Général

47, avenue Gambetta
55020 Paris

tél. : (1) 797-87-05



Mi deziras rakonti al vi aventureton okazintan dum mia reveno el la Universala Kongreso de Varsovio. Tie mi loĝis ĉe geamikoj, kiuj dorlotis min per donacoj. Mi havis la ĝojegon renkonti mian de longtempe konatan amikino, kiu donacis al mi belan portreton de Dr^o Zamenhof en ligna kadro.

Ĉu vi scias, ke Dr^o Z. kapablas paroli postmorte?... Mi ja scias!...

Antaŭ mia forflugo mi lokis mian "trezoron" en mian valizon; alveninte al la flughaveno mi frontis la doganon, kontrolojn, ktp... Mi transdonis mian valizon al la pakaĵ-servo; ĉio saĝnis en ordo! Kvietigita, mi envidiĝis. Kiam mi alvenis Francujon, kie mia filo atendis min, senpacience, apud la rul-tapiŝo, kiu transportis la pakaĵojn, mi atendis... mian valizon. Ĝi ne estis videbla. Kie do ĝi estas? Mi direktiĝis kun mia filo al la policejo kaj al la doganoficejo por peti klarigojn pri la afero.

Mi prezentis al la deĵorantoj amason da paperoj, miajn pasporton, legitimaĵon, kongresnumeron, ktp. Nenion ili volis rigardi! Koscience -sed ridetante- ili tajpis sur la komputerklavaron kaj atendis la respondon al la enŝovita demando... Mi timis, mia filo ridis pli kaj pli... Subite, tutserioze, ili diris: "Via valizo estas en observo (?) en VARSOVIO, ĉar ene estas io, kiu... "bip-bip-umas"!!!"

Imagu mian timon! Mia filo ridis!! Mi jam vidis min enkarcerigita en iu ajn malliberejo... Mi vere ne konas la kialon de tiu Bip-Bip-umado en la valizo!!...

"Vi ne respondis al la alvoko farita de la doganistoj antaŭ la forflugo de la aviadilo", diris la doganisto... Fakte mi estis alvokita pol-lingve! La oficisto ridis, mia filo ankaŭ... Mi pli kaj pli timis; kio do povas tiel ade bip-bip-umi?...

"Jes, pludiris la doganisto, oni alvokis vin en Varsovio, vi ne respondis, estas grave!.. Donu al mi la valiz-ŝlosilon: se ĉio estos en ordo, via filo povos rehavi ĝin post du tagoj. Via valizo estos malfermata kun ĉeesto de du polaj kaj svisaj doganistoj kaj policistoj; ĉeestos ankaŭ riprezentanto de la Kompanio SUISSAIR"....

Kia ceremonio, mi pensis! Mi ne bezonas aldoni, ke mi aĉe dormis tiun-ĉi nokton... Kio okazos al mi?...

Nu, vidu! En Varsovio mia valizo daŭre bip-bip-adas... ĝis oni malkovris la... KUPRAN portreton de Doktora Zamenhof, kies metalo funkciigis la kontrol-sonorilon aŭ bombon-kontrolilon!!!! "Bip-bip-bip!" diris Zamenhof... "Esperanto vivas... ĝi estas paca bombo! Bip-bip-bip!"

Mi opinias, ke, en la ĉielo, Doktoro Zamenhof tutkore ridis... "Bip-bip-bip!... Esperanto pludivas!"

Odette SCHEIDEL

Piaf kantas en Esperanto!

Si furoris en Pekino kaj ravis en Varsovio. Nun vi povas ĝui la artison de Joëlle Rabu sur 60-minuta sondisko aŭ kasedo. "Passport" inkluzivas kantojn en la angla, franca kaj Esperanto, kun plenaj tekstoj.

Ankoraŭ haveblas (6"-disko):

Omaĝo al Veselin Damjanov

Mendu de la Libroservo de UEA. Passport (kasedo aŭ disko): 31,20 gld.; Omaĝo: 6,00 gld. 1/6-a rabato por minimume 3 ekz.

Passport
Joëlle Rabu

la amiko, kiu helpas instruistojn transformi komencantojn en parolantojn

Juna amiko

4 numeroj jare, 8,40 gld ĉe UEA au nacivalute ĉe multaj perantoj. Petu specimenon de HEA, pŝ 193, H-1368 Budapest, Hungario



La amiko,
kiu paroligas



Desegnaĵoj: Pavel Rak

nos cotisations 1988

Vous venez de recevoir notre bulletin d'information sur l'espéranto, "LA INFORMILO". Vous avez sans doute apprécié son contenu et vous désirez le recevoir régulièrement (4 numéros par an). A cet effet nous vous présentons ci-dessous les différentes cotisations 1987 et nous vous invitons à les payer dès maintenant.

Nous espérons vivement vous retrouver parmi nos abonnés ou nos membres!

Nous vous recommandons vivement de choisir votre cotisation à partir de la catégorie 3. Ce faisant, vous apportez votre adhésion et votre soutien à l'UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO, association qui agit sur le plan national, tant dans le domaine de l'information en général que dans celui des relations avec les instances officielles. Vous concevez aisément que son efficacité et sa crédibilité dépendent essentiellement du nombre de ses adhérents.

COMMENT PAYER VOS COTISATIONS ET VOTRE ABONNEMENT

- 1/ Les cotisations à l'U.F.E. et à l'U.E.A. (catégories 3 et 4, colonnes encadrées) sont à payer directement à UFE, 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS - CCP: 855 35 D PARIS, en y joignant votre bulletin d'adhésion. Votre adhésion à notre Fédération est comprise dans les cotisations de l'UFE, si vous habitez les départements 54 55 57 67 68 88. Par contre l'abonnement à LA INFORMILO reste à payer à notre Fédération. Voir ci-après.
- 2/ La cotisation à la FEDERATION CULTURELLE DE L'EST ainsi que l'abonnement à LA INFORMILO sont à payer:
 = de préférence par virement postal à FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO
 CCP: 1997 72 W NANCY (pratique et sans frais)
 = par chèque bancaire à l'ordre de cette même Fédération... mais ce chèque est à envoyer à notre trésorier: A. GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM.
- 3/ Exceptionnellement, les membres du groupe de Strasbourg sont priés de verser leur cotisation au CENTRE CULTUREL ESPERANTO, CCP: 49917 STRASBOURG, en y ajoutant leur cotisation au groupe local (20), ou directement à leur trésorier, B. REIFFSTECK, 4, rue de Neuchâtel, 67000 STRASBOURG. Joindre votre bulletin d'adhésion spécifique pour les cotisations de l'UFE.

CAT. TABLEAU DES COTISATIONS 1988

- 1 = abonnement simple à LA INFORMILO
- 2 = adhésion simple à la FEDERAT. CULT. DE L'EST
- * membre fédéral (avec abonnement à LA INFORMILO)
- * membre fédéral (sans " ... pour les autres membres de la famille par exemple)
- 3 = adhésion à la FEDERATION et à l'U.F.E.
- * membre simple
- * membre abonné *ACTIF* (avec la revue de l'UFE, "FRANCA ESPERANTISTO")
- * membre de moins de 30 ans (reçoit "KONCIZE" et "JEFO informas")
- * membre abonné (conjoint)
- 4 = adhésion à la FEDERATION + U.F.E. + U.E.A.
- * membre individuel (reçoit "F.E°" + guide de UEA)
- * membre individuel (reçoit "F.E°" + annuaire de UEA + revue KONTAKTO, si moins de 26 ans)
- * membre individuel (reçoit "F.E°" + annuaire de UEA + revue mensuelle ESPERANTO + KONTAKTO si moins de 26 ans)

cotis.	abonnem. à LA INFORM°
	40 F
20 F	+ 40 F
20	+ 40
20	+ 40
80	+ 40
205	+ 40
205	+ 40
100	+ 40
237	+ 40
285	+ 40
505	+ 40

IMPORTANT

- A - Tous les membres reçoivent la carte fédérale (s'ils sont nouveaux adhérents) et la revue trimestrielle régionale LA INFORMILO (... s'ils sont abonnés)
- B - Les membres de l'UFE et de l'UEA reçoivent en plus les cartes de membre de ces associations (s'ils sont nouveaux adhérents) et les coupons 1988 donnant droit au service des délégués mondiaux dont l'adresse se trouve dans l'annuaire de UEA.
- C - Les membres de l'Enseignement sont invités à mentionner leur profession; ils seront ainsi inscrits d'office au GROUPE DES EDUCATEURS ESPERANTISTES (G.E.E.)... sauf catégorie 2.
- D - Les jeunes gens de moins de 30 voudront bien mentionner leur date de naissance; ils seront ainsi inscrits d'office à l'ORGANISATION DE LA JEUNESSE ESPERANTISTE FRANC. (J.F.E.O.) sauf catégorie 2. Ils recevront alors en plus la revue "KONCIZE" et le bulletin interne national "JEFO informas".



? U distra angelo



	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												
11												
12												

KRUCVORTENIGMO *

HORIZONTALE

1 marleono - direkti (r). 2 ano de antikva popolo - teritorio - maceri (r). 3 ĝi havas kvar egalajn laterojn (r) - organo de horloĝo. 4 ne tie ĉi - glazuro (r). 5 ĝi havas cirklan bazon (r) - senindulge - forŝteli (r). 6 muzika instrumento - kankro. 7 skribi (r) - ĝoji - entiri likvaĵon. 8 tranĉa aŭ pika - fiksi - sono. 9 indiĝena gento (r) - fari ion nova. 10 fiksilo - maniĝo(r). 11 ludilo - senutila substanco (r) - malalta tersurfaco (r). 12 numeralo - parto de macita nu traĵo - floro.

VERTIKALE 1 Prokavio - belga urbo. 2 greka monero - simbolo de pureco (r). 3 malgranda ronĝulo (r) - fiŝreto (r) - granda rivero. 4 en orbito de planedo (r) - onomatopeo - de akra rando - longa metalstango. 5 platformo - brue inspiri - prefikso. 6 malalta arbedo - ŝarĝita ero - interjekcio. 7 kiel ioma amfibio - oriento - malgranda ronĝulo (r). 8 indika tabelo - sufikso - greka litero. 9 paŝkomputilo (r) - insekto (r). 10 malnova mezurunuo (r) - interalie Nordafrikano - pintarko. 11 malgranda parto - planto kun belaj floroj - verda loko. 12 prun ti aŭ doni kontraŭ mono (r) - mesvesto (r) - prepozicio - membro de parenco.

SILABENIGMO *

Pere de la ci-subaj alfabete ordigitaj "silaboj", malkovru la vortojn, kies difino trovigas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikalaj legataj, elformas proverbon.

al ap ar ara aro at bi blo bo ce ce cio di dio dro en fa gan go il in in io io ir izo ja jak ka kaj ko la lam lo mi mo na na ne nio nis no no nui on ono op op os ov pa pi pre ra re rio ro sem so so st st ta to to tra tri uj ujo umi

- 1 + - - + - por firme starigi meblon
- 2 + - - + - - - bazo de arta kaŭĉuko
- 3 + - - + - - lezo de haŭto
- 4 + - - + - konifero
- 5 + - - + - - - trupo de muzikistoj
- 6 + - - + - - - malgrandigi
- 7 + - - + - - - ofende fiera
- 8 + - - + - - falsbrilaĵo
- 9 + - - + - - - disĉiplo de Jesuo
- 10 + - - + - - - populara festlampeto
- 11 + - - + - - streĉi siajn fortojn
- 12 + - - + - - - ruza agado
- 13 + - - + - - - kontrasto kun homeopatio
- 14 + - - + - - laŭta parolkonsento!
- 15 + - - + - - - variado de la voĉa sonalto
- 16 + - - + - - - arta kaŭĉuko
- 17 + - - + - - - senvaloraĵoj en plena konfuzo
- 18 + - - + - - - Peloponeza montaro
- 19 + - - + - - - baldaŭ dekjara
- 20 + - - + - ellasi ovon
- 21 + - - + - - - insulara ŝtato
- 22 + - - + - - parolfiguro
- 23 + - - + - - - konciza stilformulo
- 24 + - - + - en kio oni konservas laborilojn

***** FINJARA KONKURSO *****

La unua legant(in)o, kiu sendos al la redaktejo la solvojn de la du enigmoj ricevos premie la verkon de R. SCHWARTZ...

"Vole...Novele"

